

Lim-aranĝoj per kiuj Blanko venkas je 8 poentoj. (Kurso de Nigraj fuŝoj)

Ĉifoje unue montras Nigrajn fiŝajn lim-aranĝojn.





Diag. 1 (1-11) Nigro 'metrajton-tenante lim-aranĝas' ek de 'eliri' N1, N3, kaj 'bati kaj sinligi' per N5 kaj N7. Kaj efektivigas N9 kaj kaptas du ŝtonojn per N11. Ŝajnus, ke Nigro bone lim-aranĝadas. Sed verdire ĉiu el N1, N3, N5 kaj N9 estas malbona ŝtonmeto. (Blanko per B8 evitis Nigran 'tuŝmeton' N8,)

{paĝo 282 de la originalo}




Diag. 2 (12-24, finiĝas ĉe B24.) Sekve, kiam Blanko 'el-iras' kiel B12, bone estas 'bloki' per N13 (necesas B14), en MalSupra Dekstra angulo N15 kaj N17 estas ankaŭ malbona lim-aranĝo. Fine, Blanko efektivigas B18, 'batas-kaj-sinligas' per B20 kaj B22, kaj laste lim-aranĝas en Supra MalDekstra angulo kiel B24 'suben-iri'. Kio rezultas?

{paĝo 283 de la originalo}




Diag. 3 (Post singardi kaj ŝtopi liberpunktojn) Aldonante ŝtonmetis por singardi kaj ŝtopi liberpunktojn. Punktoj ‘a’, spuroj de forkapto nombriĝas po 2 poentoj. Ankaŭ mortintoj restantaj sur tabulo kalkuliĝas po 2 poentoj por unu ŝtono. Ni nombru la teritoriojn ambaŭflankajn.

Nigra teritorio: Supra Dekstra parto = 10 poentoj, MalSupra Dekstra angulo = 6 poentoj, De MalSupra MalDekstra angulo al MalDekstra rando = 17 poentoj, sume 33 poentoj.

Blanka teritorio: De Supra Dekstra angulo al Dekstra rando = 25 poentoj, Supra MalDekstra parto = 9 poentoj, centro = 1 poento, MalSupra rando = 6 poentoj, sume 41.

Kiel granda estas 8 poentoj da diferenco!

Procedo montrita en digarmoj 1 kaj 2, estas fikcia ekzemplo de fuŝaj lim-aranĝoj. Tamen tiaj ‘ne-esencaj’ lim-aranĝadoj estas reale ludataj de multaj amatoroj.

Tiaj amatoroj devus esti maltrankvilaj, eĉ se ili estas avantaĝaj je 20 poentoj kiam komenciĝas lim-aranĝado. En ludoj kun ‘anticipe-metitaj ŝtonoj’ ĉi tio estus Blanka espero.

{paĝo 284 de la originalo}

Renverse dirante, se oni iom lertiĝas en lim-aranĝado, la venko proporcio altiĝas en ludoj kun egalfortuloj, kaj facile venkos en ludoj kun ‘anticipe-metitaj ŝtonoj’.